

6-a EEU-Konferenco, Bilbao, 25 aŭgusto 2004
Inaŭgura Parolado de la Prezidanto de EEU, Seán Ó Riain

Estimataj Gesinjoroj, karaj geamikoj,

Estas por mi granda ĝojo viziti Bilbaon la unuan fojon, kaj mi elkore dankas la LKK pro la bonega prepara laboro por la Kongreso. Mi esperas ke vi ĉiuj havos ĝuindan kaj utilan kongreson, kiu multe kontribuos al la antaŭenigo de Esperanto kaj de lingva samrajteco en Eŭropo.

Hispane: *Es para mí un gran placer visitar Bilbao por primera vez, y quiero agradecer sinceramente al Comité Organizador el excelente trabajo realizado en la preparación del congreso. Espero que todos ustedes disfruten de un agradable y útil congreso, que hará una gran contribución a la promoción del Esperanto y de los derechos lingüísticos de todos los pueblos de Europa.*

Eŭske: Niretzát lehenéngo aldiz BÍlbora etórtzea plazér handía da. Alabér,batzár antolatzaileák kongrésua prestátzeko egín duén laná, olápaitu náhiko nuké biótzetik. Zuentzát kongrésu hau gúztiz balíagárria izátea espéro dut; Esperantóaren zabáلكundéaren eta Európakó herría guztíen hizkúntza eskúbideén aldéko bultzáda handía emángo duélako".

Irlande: *Is mór an chúis áthais dom mo chéad chuairt ar Bhilbao, agus gabhaim buíochas ó chroí leis an gCoiste Eagrúcháin as an sár-ullmhú don Chomhdháil. Tá súil agam go mbeidh comhdháil úsáideach taitneamhach agaibh go léir, a rachaidh go mór chun tairbhe Esperanto agus do chomhchearta teanga san Eoraip.*

Mi dankas vin ĉiujn, ke vi venis, kaj mi aparte dankas la multajn donancintojn al BKC pro ilia malavara gesto. Apartan dankon al miaj kolegoj en la EEU-estraro, Flory Witdoeck kaj Johan Derks, kiuj laboregis dum la lastaj 2 jaroj, kaj al niaj BKC kunlaborantoj, Dafydd ap Fergus kaj Marko Lins pro mirinde sukcesa laboro kun malmultaj rimedoj. Johano estis kaj kasisto kaj sekretario, kaj faris ege valoran kontribuon al nia laboro

Mi intencas mallonge mencii 10 interesojn lastatempajn evoluojn; priparoli la ĉefmalsanon kaj de Eŭropo kaj de EEU, kaj fine proponi konkretajn agadojn, per kiuj ni ĉiuj povos helpi solvi la problemojn.

10 Lastatempaj Evoluoj

- a) EU **pligrandiĝis** al 25 landoj kun loĝantaro de pli ol 450 milionoj.
- b) En junio ĉijare EU adoptis Eŭropan **Konstitucion**, kiu, kiel mi poste klarigos, aparte gravos por Esperanto.
- c) La 1 aprilo 2004 plenkunsido de la EP voĉdonis la unuan fojon pri ebla rolo por Esperanto en EU. La plimulto, kompreneble, kontraŭis; sed **43%, aŭ ĉ. 120 EP-anoj**, subtenis la konsideron de iu rolo por Esperanto. Intertempe elektiĝis la unua EP-ano kiu flue parolas

Esperanton, la polino Margareta **Handzlik**, kiu venos morgaŭ al Bilbao.

- d) Komence de 2003 publikiĝis ege grava libro de la angla Prof. R. Phillipson, jam esperantigita kiel “**Ĉu nur-angla Eŭropo?**“ Tiu libro science forigis la lastajn dubojn pri la lingva evoluo de EU: ni ĉiuj survojas al nur-angla Eŭropo, kie ĉiuj aliaj lingvoj simple ne gravos, kaj tio okazas malgraŭ la fakto ke anglalingvaj denaskuloj kiel elcentaĵo de la **monda** loĝantaro malpligrandiĝis de **11% en 1950 ĝis 5.6%** (en EU 13%) nuntempe.
- e) Kiel por konfirmi la tezon de Phillipson, en **Februaro 2002 Britio** decidis ke ĉiuj lernantoj je la aĝo de 14 rajtas ĉesi lerni fremdlingvojn. Ega maloftaĵo en la diplomatio, 4 ambasadoroj, de Francio, Germanio, Hispanio kaj Italio publike protestis kontraŭ tiu decido.
- f) Julie 2001, la EU-Komisiona Prezidanto **Prodi** proponis uzi nur la anglan por multaj internaj laboro de la Komisiono. Li tuj ricevis protestleterojn de la franca kaj germana Ministroj por Eksteraj Aferoj, Védrine kaj Fischer.
- g) Julie 2002 la pola Ministro por Eksteraj Aferoj Cimoszewicz decidis ke la eksterlanda servo de **Pola Radio** havos 3 prioritatajn lingvojn: la anglan, la germanan kaj Esperanton. Mi tre ĝojas ke la estrino de la Esperanto-Rekacio de Pola Radio, Barbara Pietrzak, ĉeestas nian konferencon.
- h) En marto 2002 Komisionano **Kinnock** respondis al demando de la itala EP-ano Turco pri Esperanto kiel pontlingvo por la interpretado kaj tradukado en EU. Negativa respondo, kompreneble, sed almenaŭ serioza, kaj eĉ ne komplete negativa.
- i) Fine de 2002 malavara japana mecenato, Etsuo **Miyoshi**, decidis financi gazetan anonckampanjon por antaŭenigi Esperanton kaj lingvan samrajtecon en Eŭropo. Al li niajn eklorajn dankojn.
- j) Dum la lasta jaro la paĝoj en Esperanto trovita de la serĉmaŝino GOOGLE pligrandiĝis de **40%**, kaj nun atingis **1.2 milionoj**. Por komparo, la rezulto por “Español” estis **8.3 milionoj**, kaj 400 milionoj parolas hispane.

Ĉefmalsano de Eŭropo

La ĉefmalsano de Eŭropo, laŭ la klarvida Prof. Helmar Frank, estas la manko de eŭropa “ni-sento”, de komuna eŭropa identeco sentita de niaj 450 m. kuncivitanoj. En lia kolora lingvo: “por multaj, Eŭropo estas apenaŭ pli ol **regiono de harmoniigitaj porkoprezoj**”, kaj tia Eŭropo neniam havigis al si la lojalecon kaj la amon de la popoloj de Eŭropo. Se vi volas kontreti vidi simtomon de tiu malsano, **rigardu Eŭro-monbileton**. Vi tuj vidos la

problemon: ĝi estas senvorta, ĉar ne ekzistas lingvo por esprimi eŭropan identecon. Tiu manko klare havas politikajn kaj ekonomiajn sekvojn.

Eta anekdoto: En Kebekio savnaĝisto estis vokita antaŭ tribunalon. Li deĵoris kiam viro dronis en rivero kaj, kvankam la viro vokis por helpo, la savnaĝisto nenion faris.

Demando: Ĉu vi aŭdis la kriegojn kiam la viro falis en la riveron? Jes. Kial vi nenion faris? *Ĉar mi ne scipovas naĝi.* Kaj kiel vi ricevis postenon kiel savnaĝiston? *Ĉar mi estis la sola kandidato kiu flue parolis angle kaj france.*

Tio eble mirigas vin, kaj vi pensas ke tio ne povas esti. Sed estas analogia situacio kiu, ŝajne, mirigis neniun: la angla lingvo en la 1950-aj jaroj ricevis la "postenon" de sola laborlingvo en la internacia aviado **sen iu ajn testo por kontroli ĉu ĝi estas la plej taŭga lingvo**, nur ĉar ĝi estis la lingvo de Usono. Kaj nun estas grandega riski ke ĝi fariĝu la komuna lingvo de Eŭropo, denove sen iu ajn ekzameno por kontroli ĉu ĝi havas la kvalifojn por la posteno.

Kial la angla maltaŭgas kiel komuna eŭropa lingvo?

Unue, ĉar ĝi estis denaska por 13% de EU civitanoj; do ĝi neniam povos doni lingvan samrajtecon.

Due, **Claude Piron** skribis en "Le Défi des Langues" ke 20 lingvoj testiĝis por sendi mesaĝon kie estis granda bruo. Gajnis la itala, Esperanto estis en la dua loko, kaj la angla en la 18-a loko. Usonaj inĝenieroj kiel Cushing kaj Kent Jones skribas pri kiom da **aviadilaj akcidentoj** okazas pro miskomprenoj inter malsamaj prononcm manieroj de la angla, kaj Cushing ne estas Esperantisto. La angla fonetikisto, kaj antaŭa Prezidanto de UEA, Prof. John Wells, skribis en la festlibro por la eminenta hispana Esperantisto, **Juan Régulo Pérez**, ke Esperanto, kiel la hispana aŭ la vaska, havas 5 literojn por skribi 5 vokalojn; la oksforda angla, kontraste, havas 5 literojn por skribi 20 vokalsonojn.

Prof. Phillipson en pluraj libroj klare montras kiel Usono kaj Britio elspezis grandegajn sumojn da mono por antaŭenigi kaj instrui la anglan mondscale. En la vortoj de Prof. Probal Dasgupta, "**La angla perbuĝete fabrikas la konsenton, la franca perprestigas ĝin**". Aliflanke, la nuna angligo / usonecigo de Eŭropo klare donas la pli bonan ŝancon al Esperanto. Nenie alie en la mondo, kaj neniam en la tuta homa historio ekzistis organizaĵo kiel EU, kun 20 oficialaj laborlingvoj. Malgraŭ tio, la Eŭro restas senvorta.

« Esperanto-mono » kaj la artefariteco de Esperanto

Antaŭ 10 jaroj germana politikisto atakis la ideon de la Eŭro kiel utopiaĵon, aŭ "**Esperanto-monon**"; sed tiu « Esperanto-mono » estas nun en la poŝoj de pli ol 300 milionoj homoj, kaj pli fortas ol la usona dolaro. En la tuta diskuto pri la Eŭro, neniu proponis ke EU povus adopti la DM, la pli fortan nacian valuton,

aŭ la usonan dolaron. Kial la usona lingvo pli akcepteblas ol la usona mono? Nur ĉar homoj ne vidas realan alternativon.

Estas nia tasko konvinki ilin ke Esperanto ja estas realigebla alternativo, kaj ne utopiaĵo. Al kontraŭuloj de Esperanto, ni tuj demandu: „Ĉu vi konas la fakliteraturon? Ĉu vi legis la kontribuon de Dr. Detlev Blanke pri la 28 etapoj, tra kiuj Esperanto evoluis por transformiĝi de projekto al vivanta lingvo?” La vera problemo estas ke la plimulto da „seriozaj“ homoj ne traktas Esperanton serioze, kaj plenas je eksmodaj antaŭjuĝoj. Oni opinias ke ĝi estas “artefarita, ne vivanta lingvo; iu bastarda miksaĵo da lingvoj”. La lingvisto Mario Pei jam skribis ke nomi modernan Esperanton “artifarita lingvo” estas kiel diri ke aŭto estas “**artefarita ĉevalo**”! Strange, oni neniam nomus infanon, kies vivo komencis artefarite en **provtubo**, “artefarita infano”. Kaj oni malmulte parolas pri la „artifariteco“ de la **muziko** de Mozart aŭ Beethoven.

EU-Konstitucio kaj Praktika Agado

Sed ni ne povas sukcesi sole, ni bezonas aliancinojn. Kie ni trovu ilin? Inter la defendantoj de naciaj kaj malplimultaj lingvoj. La nova EU-Konstitucio malfermas pordon: Sub Titolo VI, Artikolo I-46 (4),

„unu miliono da civitanoj el signifa nombro de membroŝtatoj povos inviti la Komisionon fari iniciaton pri aferoj kie civitanoj konsideras ke leĝa akto de EU necesas por efektiviĝi la Konstitucion.“

La Konstitucio ja garantias la samrajtecon de civitanoj, sed ni bone scias ke la praktiko de EU ne respektas la lingvan samrajtecon. Kune kun la defendantoj de la franca, la germana, la hispana, la vaska, kpt. Esperantistoj certe povus arigi unu milionon da subskriboj. Tion ni povos fari tuj kiam la EU-Konstitucio ekvalidos – verŝajne dum 2006, sed ni povas jam nun kultivaj bonajn rilatojn kun la defendantoj de aliaj lingvoj, ĉiuj minacataj de la angla.

Nenahavebla kondiĉo por havi la kunlaboron de la aliaj estas ke ni substreku la lernfaciligajn ecojn de Esperanto, kaj ĉiam menciigu la gravecon de lingva diverseco: Eŭropo estos « Unueco en Diverseco », aŭ ĝi tute ne estos.

Praktike, mi proponas:

- a) ke ni membriĝu en lingvodefendaj organizaĵoj, kaj aktive subtenu ilian agadon;
- b) ke ni pripensu kiel interesigi pli da profesiaj tradukistoj kaj buŝ-tradukistoj al Esperanto. Mi proponas ke la EEU-Komitato nomu apartan komisiiton por ili. Aliajn praktikajn proponojn mi faros al la Komitato.

Ĉu tio signifas ke ni kiĥote kontraŭbatali la anglan? Tute ne. **Ni kontraŭbatalas ne la anglan, sed la maljustecon.** Tio estas nia kialo por ekzisti. Maljusta estas maljusta estas maljusta, **kaj neniu argumento pri praktikeco aŭ io ajn alia konvinkos nin akcepti ĝin.**